

Pri la Plena Vortaro de Esperanto, kiu estas 50-jara
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 445, 1981.01.15 & 17

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Dum la pentekosta semajnfino disvolviĝos en La Chaux-de-Fonds kolokvo, kies priokupo estos la **vortfarado kaj vortaroj**. La **Fundamento de Esperanto** farigis pasintjare 75-jara, la **Plena Vortaro de Esperanto** 50-jara kaj la **Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto** dek-jara. Tiuj lastaj fundamentaj verkoj ŝuldas multon al la vortfarada teorio, kiun proponis la ĝenevano **René de Saussure**, la frato de la granda lingvisto **Ferdinand de Saussure**. Jen la momento por malfermi ĝeneralan diskuton pri la teorio mem de **René de Saussure**, kiun esperantologoj ekkritikas, kaj pri la vortara monumento **Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto**, kiun la esperantistoj nomas **PIV**.

A.- Tiu ĉi kolokvo malfermos novan kurssesion de Internacia Feria Altlernejo. La provo starigi Internacian Ferian Altlernejon en la urbo La Chaux-de-Fonds estas karakterizaĵo de la esperantismo en Svislando. Tial per niaj radio-elsendoj ni provas speguli tiun ĉi kulturan aktivecon, sciante ke multaj geaŭdantoj aprezas tiun ĉi per-radian eĥon de la IFA-kursoj.

Cl.- La partoprenontoj al la kolokvo pri **vortfarado kaj vortaroj** estas petataj relegi la antaŭparolon al PIV, teksto historie kaj esperantologie tre grava, kiun kolokvanoj ne rajtas ignori. Ankaŭ en kelkaj radio-prelegoj ni turnu nian atenton al tiu ĉi interesa teksto, kiu resumas la labormetodon de **Gaston Waringhien** kaj de ties kunlaborantoj, inter kiuj ni menciuj **André Albault**, **Paul Neergaard**, Carl Stop-Bowitz kaj R. Haferkorn. Neniu kritiku verkon sen koni la situacion en kiu ĝi ellaboriĝis.

A.- La "Ĝenerala Antaŭparolo", verkita de Gaston Waringhien, tiam Prezidanto de la Akademio de Esperanto, komenciĝas per historia raporto, el kiu ni hodiaŭ abunde citos.

Cl.- "Kiam, en Decembro 1927, Lanti konvinkis Emile Grosjean-Maupin, tiaman Direktoron de la Akademia Sekcio pri la "Komuna Vortaro", entrepreni revizion, modernigon kaj ampleksigon de la elĉerpita "Vortaro de Esperanto" de Kabe, ili antaŭ ĉio akordiĝis pri la karaktero de la nova verko: ĝi estu oportuna, praktika gvidilo por la ordinara esperantistoj; ne gravas, diris Lanti, ĉu tia gvidilo ne estos absolute perfekta: la ĉefa afero estas, ke ĝi ekzistu, ke oni ĝin vaste uzadu, kaj ke el tiu uzado rezultu la unueciĝo de la komuna lingvo."

A.- Lanti kaj Grosjean-Maupin "tute ne volis doni erudician, historian monumenton, kiel ekz. la tiam laŭkajere aperanta "Enciklopedio Vortaro" de Eugen Wüster".

Cl.- "Grosjean-Maupin tion klare difinis en sia antaŭparolo: "Servi ne nur al tiuj, kiuj deziras ĝuste kompreni ĉiujn esprimojn kaj nuancojn de Esperanta teksto, sed ankaŭ al tiuj, kiuj volas korekte kaj bonstile verki ion en Esperanto". Por tion atingi, la plej taŭga rimedo estis la citado de ekzemploj, kiuj estu klaraj, mallongaj kaj aŭtoritataj..."

A.- "La laboron devis principe fari Albert Esselin kaj Gaston Waringhien, utiligante la abundan sliparon, jam de jaroj kolektitan de Grosjean-Maupin, kaj aldonante sian propran materialon; Grosjean-Maupin mem devis korekti, revizii kaj kompletigi tiun unuan redaktaĵon. Sed tre baldaŭ Esselin... grave malsaniĝis, kaj Grosjean-Maupin devis preni sur sin la restantan parton de la laboro antaŭe difinita al Esselin, dum Gaston Waringhien devis

aparte redakti la gramatikan kaj vortfaradan parton (afiksoj, prepozicioj, konjunkcioj, subjunkcioj kaj cetere)."

Cl.- "A1 tiu komunlingva vortaro Lanti decidis aldoni nombron da teknikaj terminoj, kaj por tio li turnis sin al S. Grenkamp-Kornfeld..."

A.- "Oni devas ne forgesi la rolon de Lanti rmem, kiu seninterrompe helpadis kaj konsiladis en tia senprecedenta entrepreno, solvante kun saĝa takto la teknikajn problemojn de la presado same kiel la personajn malfacilaĵojn, kiuj okaze leviĝis inter la redaktantoj de la komunlingva parto kaj tiu de la teknika parto."

Cl.- "La tiel kompilita vortaro, aperinta en oktobro 1930, malgraŭ la neeviteblaj mankoj kaj difektoj, montriĝis tiel taŭga kaj bezonata, ke jam en la samjara decembro Lanti planis duan eldonon, en kiu la teknika terminaro prezentus apartan volumon. Sed la distribuo de la vortoj inter tiuj du partoj montriĝis tro malfacila, kaj oni decidis konservi la formulon de la unua eldono. Cetere Grenkamp-Kornfeld preskaŭ nenion ŝanĝis en sia kontribuo. Male la komunlingva parto grave pliriĉiĝis de la senĉesa kolektado de tipaj ekzemploj, kiun faradis Grosjean-Maupin kaj Waringhien.

A.- « La nova eldono aperis en julio 1934, ĉirkaŭ ses monatojn post la morto de Grosjean-Maupin; ĝi entenis 7004 artikolojn - nur ĉirkaŭ 200 plie ol la unua - sed la enhavo de multaj el ili konsiderinde kreskis."

Cl.- Pri la valoro de tiu ĉi verko Gaston Waringhien tiel ĉi konkludas:

A.- "Tia, kia ĝl estis en sia dua eldono, la Plena Vortaro efektive plenumis la intencitan rolon de fiksanto de la lingvo kaj de diskreta konsilanto de la uzantoj. Komence atakita de kelkaj ĝisostaj kontraŭneologismemuloj, ĝia aŭtoritato fariĝis iom post iom ĝenerale rekonita.

Cl.- "Sed en tiu tempo Lanti kovis pli aŭdacan projekton: li volis, ke la Plena Vortaro fariĝu ia ilustrita enciklopedio, analoga al la franca vortaro "Petit Larousse Illustré". Lia instigo (apogita de listo da vortoj kaj ekzemploj, kiujn li mem kolektis el la "Malnova Testamento" tradukita de Zamenhof)... kuraĝigis Gaston Waringhien entrepreni fundan revizion de la Plena Vortaro, kun aldonon inter alie de la propraj nomoj historiaj kaj geografiaj, kaj kun la starigo de scienca terminaro komisiita al specialistoj, kiuj funde povoscias nian lingvon. La fortune tiam renkontigis al li tri tiajn idealajn kunlaborantojn, Paul Neergard, Carl Stop-Bowitz kaj W. J. Nijveld, kies kontribuoj respektive pri la botaniko, la zoologio kaj la kemio prezentis modelojn de scienca metodo kaj de leksikologia lerteco.

A.- "Ĉar la cirkonstancoj ne favoris en tiu tempo la eldonon de granda vortaro, Gaston Waringhien decidis uzi la jam akiritan materialon en iu Esperanta-franca vortaro, kiu estus kvazaŭ la ĝenerala provado de la Plena Ilustrita Vortaro, rilate la nombron de la radikoj, la difinojn de la sencoj, kaj la strukturon de la tuta verko...

Cl.- La vortaro "Grand Dictionnaires Esperanto-français aperis en oktobro 1957"

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond citante el la antaŭparolo al PIV raportis pri la Plena Vortaro de Esperanto, kiu estas kvindekjara. Ĝis reaŭdo!